Fine la tuta ĉeestantaro kantis starante: "Savu la reĝon Di'!"

## La Agadaj Kunsidoj

La agadaj kunsidoj de la kongreso okazis de mardo, la 13'a, ĝis vendredo, la 16'a de Aŭgusto antaŭtagmeze en la granda ĉambrego de la urbdomo. Malgraŭ la bela vetero la plejmulto de la kongresanoj preferis ĉeesti tiujn ĉi gravajn kunvenojn, aŭskultis kun pacienca intereso la multnombrajn kaj parte longtempajn diskutadojn kaj decidojn; Sur la estrado sidis la samaj personoj, kiujn ni vidis ĉe la malferma kunsido en la scenejo. En la mezo Dro. Zamenhof kaj la Trianoj, ĉirkaŭe la diversnaciaj delegitoj. Sro. Mudie majstre prezidis la kunsidojn; Sro. Moch kaj Sro. Chavet zorgis pri la oficiala protokolo, helpataj de franca fraŭlino, kiu per stenografa maŝino lerte kaj facile fiksis ĉiujn parolojn. En la malantaŭo la nova blazonflago estis starigita.

Ni ne povas detale raporti pri ĉio, kio estas parolita, diskutita kaj decidita en la agadaj kunsidoj, kaj devas rimarkigi nur tion, kio ŝajnas al ni precipe grava kaj interesa.

*Mardo, la 13a de Aŭgusto.*—Sro. Chavet legis la raporton pri la progresoj de Esperanto dum la pasinta jaro. En ĉiuj partoj de la mondo nia afero ĝojige kreskis, precipe en Ameriko. Sro. Montrosier, redaktoro de Tra la Mondo, parolas pri la stato de Esperanto ĉe la Ruĝa Kruco. Sro. Rene Deshays atentigas pri la graveco de Esperanto por la internaciaj rilatoj de la socialistoj.

*Merkredo, la 14a.*—En tiu ĉi kunsido plej grandan intereson ekscitas Sro. Mayor, okdektrijara, famekonata profesoro de la latina lingvo ĉe la Cambridge'a universitato. La maljuna sinjoro diras per laŭta kaj viva voĉo kelkajn favorajn vortojn por Esperanto kaj estis kore aplaŭdata. Poste oni diskutas pri la ĉiujara festo de Esperanto kaj akceptas la principon de la neceseco de tiu ĉi festo, ne ankoraŭ decidante certan tagon. La kongreso aprobas la kreon de Esperantista Marista Ligo, kaj admonas insiste la havenajn grupojn, por ke ili helpu plej eble la agadon de tiu ligo.

*Ĵaŭdo, la 15a.*—Sro. E. K. Harvey el Ameriko legas leteron de la redaktoro de la *North American Review*, kiu invitas la esperantistan kongreson al Ameriko en la jaro

Digitized by Google